**Saluton! Nun sekvos la aŭskulta parto de la abiturienta ekzameno.**
**Tiu parto enhavos tri taskojn. Vi aŭdos ĉiujn tekstojn dufoje, kaj vi devos solvi la taskojn en tiu ĉi kajereto.**

- **Ĉiu tasko komenciĝos kaj finiĝos per muziko. Poste vi aŭdos la instrukciojn (vi povos ilin ankaŭ legi antaŭ ĉiu tasko).**
- **Post tio vi havos tempon legi la tutan taskon.**
- **Tiam vi aŭdos la tekston la unuan fojon.**
- **Denove sekvos silento.**
- **Poste vi aŭdos la tekston la duan fojon.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

**La tuta ekzameno daŭros 30 minutojn. Bonan laboron!**

**1. En la unua parto vi aŭdos faktojn pri Australio. Skribu, pri kio rilatas la ciferoj!**
**(0) estas ekzemplo por vi.**

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

*0. 7.686.801 km$^{2.}$* *la teritorio*

1. 18.238.600: _____
2. 1500 m: _____
3. 1851: _____
4. 6: _____
5. 1911: _____
6. 1997: _____

**2. Nun vi aŭdos tekston pri la historio de poŝtmarkoj. Estos tri ĉapitroj.**
a) **Skribu, ĉu la asertoj pri la unua ĉapitro estas veraj aŭ falsaj?**
**(0) estas ekzemplo por vi.**

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

| | V | F |
|---|---|---|
| *0. Antaŭ 160 jaroj en Anglio trafikis poŝtaj veturiloj.* | + | |
| 7. Ili veturis nur se la vetero estis bela. | | |
| 8. Tiuj veturiloj veturigis ankaŭ pasaĝerojn. | | |
| 9. Tiuj veturiloj veturigis la poŝtaĵon en sakoj. | | |
| 10. Tiutempe oni devis pagi nur la pezajn leterojn. | | |
| 11. La prezo dependis ankaŭ la nombro de ĉevaloj de la veturilo. | | |
| 12. La prezon la poŝtistoj kalkulis tre facile. | | |
| 13. Oni antaŭpagis la leterojn, kiel hodiaŭ. | | |

**b) Finu la asertojn pri <u>la dua</u> ĉapitro!**
**(0) estas ekzemplo por vi.**

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

*0. La poŝtveturilon atendis ankaŭ <u>bela knabino</u>.*

14. Ŝi jam estis _____ .

15. Sinjoro Hill grandanime pagis por _____ .

16. La leteron sendis la _____ de la knabino.

17. Ŝi _____ transpreni kaj legi ĝin.

18. Por diri, ke ankaŭ ŝi bonfartas, la letero devus _____ .

19. La gefratoj havis informojn unu pri la alia pere de _____ .

20. Sinjoro Hill – malgraŭ sia volo – faris _____ .

**c) Laŭ la <u>tria ĉapitro</u> de la teksto elektu, kiu ero estas ĝusta, skribu ties literon en la tabelon!**
**(0) estas ekzemplo por vi.**

- **Unue legu la taskon! Poste vi aŭdos la tekston dufoje.**
- **Fine vi havos tempon kontroli viajn respondojn.**

*0. Sinjoro Hill pripensis la aferon _____ .*
*a) kiam li finis sian vojaĝon* *<u>b) dum la vojaĝo</u>* *c) post longa tempo*

21. Li skribis leteron al _____.
a) la ŝtato b) la reĝino c) la poŝtestro

22. Li proponis _____ .
a) postpagon kaj altajn postulojn
b) pli malaltajn antaŭpagojn kaj glumarkojn
c) altajn gajnojn per la videblaj glumarkoj

23. Liajn proponojn oni _____ .
a) unue priridis b) tuj akceptis c) tute ne respondis

24. Sinjoro Hill _____ .
a) eklaboris ĉe Brita Poŝto b) neniam laboris c) fariĝis poŝtestro

25. Sinjoro Hill _____.
a) faris entute 300 proponojn b) anoncis konkurson c) gajnis konkurson

26. Sur la unuaj poŝtmarkoj estis desegnita _____ .
a) la kapo de Hill b) poŝtoficejo c) la kapo de la reĝino

27. La proponon de sinjoro Hill oni realigis do _____ .
a) neniam b) en 1840 c) fine de majo 1840

| **0** | **21.** | **22.** | **23.** | **24.** | **25.** | **26.** | **27.** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *b* | | | | | | | |
| | | | | | | | |
| | | | | | | | |

*A dolgozatpontok vizsgapontokká való alakítását a Javítási-értékelés útmutató tartalmazza.*